



FLANDRA ESPERANTISTO

MONATALE REVUO



ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

NI MOBILIZU ! — KOMUNIKOJ DE LA ESTRARO. — 50 NOMOJ.
— JAM ! — LIBERA TRIBUNO. — LA STUDANTO. — LA
ANGULO DE LA SERCEMULO. — ESPERANTO IN DE PRAK-
TIJK. — BIBLIOGRAFIO. — DIVERSAJOJ — TRA LA ESP-
GAZETARO — INTER NI — LA ANGULO DE LA SERCEMULO.

Orgaan van den
VLAAMSCHEN ESPERANTISTENBOND

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA
FL. L. E (Vlaamsche Esperantisten Bond) FL. L. E.

HOOFDBESTUUR :

Voorzitter : Dr. Th. VAN GINDERTAELEN, Stefaniestraat 44, Antwerpen.
Ondervoorzitter : G. BAUMERS, Korte Veldstraat 35, Turnhout.
Secretaris : G. DEBROUWERE, Magdalenstraat 29, Kortrijk (tel. 1654).
Penningmeester : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.

DIENSTEN :

Boekhandel (F. E. I.) : E. CORTVRIENDT, P. Van Humbeekstraat 3, Brussel-W.
Examens : Dr. F. ROOSE, Guido Gezellelaan 15, Brugge.
Tentoonstellingsmateriaal : G. DE BOES, Wijnstraat 81, Ronse.
Voordrachten : A. ACKAERT, Gerardstraat 162, Brussel 4.

ORGAAN :

« Flandra Esperantisto » verschijnt om de maand. — Redactie : Fr. VAN DOOREN, Langstraat 40, Borgerhout. Kopij uiterlijk op 15^{en} van elke maand bij de redactie. — Administratie : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel. Postrekening nr. 2321.50 van Flandra Ligo Esperantista, Brussel. — Barema der advertenties op aanvraag bij de administratie.

BIJDRAGEN :


Leden-abonnten : fr. 25.— 's jaars; gewone bondsleden : fr. 5.— 's jaars.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas :
FLANDRA LIGO ESPERANTISTA!

Flandra Esperanto-Instituto

VENDAS LA PLEJ
BELAJN INSIGNOJN !

JE PREZOJ
PLEJ MALALTAJ !



(La bildo montras la realan grandecon)

Modelo 1 ekzistas nur kun pinglo kaj speciale taŭgas por ornami kravaton; modeloj 2 kaj 3 ekzistas kun broĉo aŭ butono; modelo 4 ekzistas nur kun broĉo. Ĉiuj insignoj estas unuakvalitaj kaj fabrikitaj el orumita bronzo.

La sekcioj kaj reprezentantoj de Flandra Ligo Esperantista ĝuas 10 %-an rabaton kaj afrankitan sendon.

Aliaj klientoj aldonu 10 % por sendkostoj.

FLANDRA ESPERANTISTO

ORGANO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Langstraat 40
Borgerhout ANTWERPEN

ADMINISTRACIO : Vlaamsche Stw. 70
BRUSSEL. P. C. K. : 2321.50 de FL. L. E.

La redakcio rezervas al si la rajton rifuzi, korekti, mallongigi aŭ iel ajn ŝanĝi la ensenditajn kontribuojn.

Jara kotiz-abono 25 fr.

APERAS MONATE

Ni mobilizadu !

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj.

L. L. Zamenhof.

Antaŭ pli ol dek jaroj nia Flandra Ligo Esperantista komencis organizi sian armeon, por la defendo de nia granda idealo en nia landparto.

Oh, estis tre pacama armeo la nia! La entuziasmo, la espero kaj la bonvolo estis niaj armiloj. Nia celo estis grandega : helpi konkeri la tutan mondon por nia afero, kaj unuavice : la verdigo de nia propra regiono.

Niajn anojn ni rekrutis en ĉiuj medioj kaj en ĉiuj tavoloj de nia popolo per la konvinkigo de nia vorto. Kun centoj ili aliĝis en niajn rotojn allogitaj de la idealismo de nia bela afero.

Dum pli ol dek jaroj nia armeo konstante kreskis, marŝante kaj propagande tra ĉiujn provincojn, urbojn, vilaĝojn kaj parohetojn plantante ĉie nian triumfantan, verdan standardon.

Sed, ne ĉiam la venko estis facila. Niaj malamikoj : la konservativismo, la indiferenteco, la mokado kaj la miskompreno, nin atakis, kaj ne malofte, kun terura efiko. Niaj propraj vicoj estis fojon post fojo maldensigataj kaj konstante ni devis serĉi novajn volontulojn por anstataŭi la forfalintojn.

Tamen, neniam ni perdis la kuraĝon. Ĉiam antaŭen ni marŝis je la sonoj de la « Espero », kaj konstante ni gajnis terenon. Momentaj malfacilaĵoj ne povis nin senarmigi, okazaj batoj ne povis nin venki kaj dum tempoj de deviga haltado ni, laŭ la pruvitaj reguloj de la strategio, ruze kaj zorgeme plifortigis la prenitajn poziciojn.

Senfinan kuraĝon ni ĉerpis el la scio ke ni ne luktis solaj. En ĉiuj partoj de la mondo frataj armeoj, sub la sama standardo kaj kun la sama devizo en la koro, batalis la saman batalon kiel ni.

Sed, jen la horizonto malheliĝis. Novaj teruraj danĝeroj nin ekminacis kaj subite eksplodis ĉirkaŭ ni neniigan katastrofon kiu skuegis nian tutan mondon.

KOMUNIKOJ de la estraro.

ESTRARKUNVENO. — La renovigita estraro de Fl. L. E. unufoje kunvenis en Antwerpen, la 7-an de Januaro 1940, sub prezido de S-ano Van Gindertaelen. Ĉiuj estraranoj ĉeestis.

Gi ekzamenis la ĝeneralan situacion de la Ligo kaj de ĝiaj servoj.

Rilate la mobilizitaj membroj, estis decidata ke la kotizo de simpla membro devas esti pagata.

Proponojn por starigi laborplanon rilate al interna, enlanda kaj eksterlanda vivo de la Ligo okazigis interesan debaton. Kelkaj taskoj estis dividataj inter la estraranoj. Ili ekzamenos la proponojn kaj poste starigos detalan laborplanon. Ni esperas baldaŭ ĝin publiki en Fl. E.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO. — En la administracio de nia libro-servo okazis grava ŝanĝo. S-ano Emiel Cortvriendt estis elektita kiel direktoro-kasisto, anstataŭ S-ano Debrouwere kiu petis esti malŝarĝita de tiu tasko. Sekve, la adreso por la librejo nun estas : P. Van Humbeekstraat 3, Brussel-West. La estraro de F. E. I. nun konsistas jene : Prezidanto F-ino J. Terrijn; sekretario S-ano G. Debrouwere; direktoro-kasisto S-ano E. Cortvriendt; administrantoj S-anoj A. Cognie kaj A. De Keyzer.

Imitinda ekzemplo. — Okaze de la nova liga jaro, kaj sekve al nia alvoko, sekcio Bertem aligis ĉiujn membrojn kiel « membro-abonantoj ». Imitinda ekzemplo kiu certe meritas specialan mencion !

« **LA STUDANTO** ». — Pro la soldatiĝo de ambaŭ prizorgantoj de tiu rubriko ni devis serĉi anstataŭanton.

Ni havas la plezuron anonci ke nia liga prezidanton mem transprenis la taskon. Al li nian plej koran dankon.

Por ĉio konsernante « La Studanto » oni do estonte skribu rekte al s-ano Th. Van Gindertaelen, Stefaniestraat 44, Antwerpen.

(Daŭrigo de p. 17.)

Feliĉe la milito ne trovis nin tute nepreparitaj. Tamen la danĝero estas granda. Ni krii alarmon.

Ni mobilizadu nin !

Ni nepre kaj urĝe reorganizu nian armeon por ĝin adapti al la novaj cirkonstancoj. Ĉiuj malnovaj, lacigitaj pioniroj denove devas sin prezenti kiel rezervoficiroj kaj sin meti sur la postenojn devige forlasitajn. Ni devas plifortigi niajn kadrojn, promociante ordinarajn vicajn samideanojn je l' respondeca rango. Ripozantaj kaj retiriĝintaj anoj devas esti vokataj por ree preni sian lokon inter la aktivularon.

Jam nia Ligo elektis al si novan, kapablan estraron kiun ni tre bone povus nomi nian « militestraro ». Kun firma mano, sub gvidado de nia nova ĉefo, S-ano Th. Van Gindertaelen, ĝi ebligos al nia pacarmeo rezisti la danĝerojn.

Tiel organizitaj, kun tia gvidantaro kaj bone ekipitaj de Espero, ni ne devas timi kaj povas certi pri la fina triumfo.

Ni mobilizadu nin !

Fr. Van Dooren.

LA ŜERCENULOJ

LA KLUBO DE L' PATRIARKOJ.

Ses amikoj en kontoro,
De serĉado amatoroj,
Iam fondis strangan kulbon :

(De l'edzinoj la inkubon).
Unu punkt' de l'reglemento,
Kaj laŭ ĉies plenkonsento
Ja menciis ke, je l'varbo
Devo estas longa barbo.
Kaj la nom' de l'nova barko
Estis : « Klub' de l'patriarkoj ».

Tuj la barboj ekkreskadis
Kaj la ses' per ĝi paradis
Dum semajna klubkunveno.
Pipon longan, ho, sen ĝeno,
Ili fumis petoleme,
Kaj amuzis sin ekstreme.
Kun mokrido tre paskvila
Ili ĉiuj fieris pri la
Longa barb', cinika marko
De la klub' de l'patriarkoj.

Kaj jen skizo de l'aspekto
De la bela barbkolekto :
Unu pintan barbon havis
Kies flavkoloro ravis,
Dua : broson de Moizo,
Tria : helpon por la krizo
De matraĉoj. Kaj la kvara
Ŝajnis cent-dudek-sep-jara.
Jen do kelkaj belrimarkoj
Pri la klub' de l'patriarkoj.

Kaj de l'kvina membro l'barbo,
Kvazaŭ birdonest' sur arbo,
Estis ruĝa; li komprenis
Ke mirige ĝi konvenis
En la barba harmonio.
Sed vi vidus ne sen krio
La de l'sesa dokumenton :
Multkoloran harserpenton.
Troni povus li per arko
Je la klub' de l'patriarkoj.

Sed protestis la edzinoj
Pri la ŝercemul-inklinoj,
Kaj vi ankaŭ jam komprenis
Ke l'protesto vane venis.
Tamen unu el la inoj
Ekmeditis pri fikrimoj
Kaj alvokis per raporto
La fratinojn de la sorto.
Kaj komplotis l'inaj ŝarkoj
Kontraŭ l'klub' de l'patriarkoj.

Kaj dum bela nokt' de l'amo
L'adeptinoj de sanato
Per tondil', en kusen' lita
Ruze estis ĝi kaŝita,
Francis for la harjuvelojn,
Post l'estingo de l'kandeloj.
Tiel kiel ĉe Simsono
Venkis niaj amazonoj,
...Kaj pereis la ses barboj
De la klub' de l'patriarkoj.

Poel Van der Poel.

HELPU NUN EVITI L' KRIZON
PER LOJALA FAR',
KAJ TUJ PAGU LA KOTIZON
POR ĈI TIU JAR'.

50 Nomoj

Estis dum bela somera tago. Granda autobuso kun 30 tre gajaj samideaninoj staris antaŭ mia perspektivturo. (Gastejo en la nederlanda vilaĝo Groesbeek). Multe ili ridis; multe ili miris, precipe pri la fascinige misterplena listo, kiu pendas en la turo. La listo enhavas 50 nomojn — kaj kvankam mi estis kaj estas granda nulo en nia movado, mi ĉiam emfaze deklaras : Jen nia nova « Lingvo-Komitato ».

Protestoj ! Protestoj ! Vi ne estas kompetenta ! Kial vi ne respektas niajn oficialajn instancojn ? Respondo : Nu, mi ja sentas grandan respekton antaŭ niaj pioniroj, tamen mi, kiel praktikulo konstatis, ke oni faris nenion. Pro tio la listo. Por forigi la scivolemon de la karaj samideaninoj for de la stranga listo, mi faris mian kutiman paroladon pri la nederlandgermana landlimo ktp., sed la aŭskultantaro kategorie interrompis per la vortoj : « Vi parolu pri la stranga listo en la turo ! »

« Bone, » mi diris, taŭga esperantocerbo ja devas al kutimiĝi ankaŭ al nekutimaj paroltemoj. Do — antaŭ ol tuŝi la kernon de la demando, estas necese, eldiri ĉi tion : mi estas esperantisto, kiu ellernis la lingvon sen instruisto, sen vortaro. Al miaj nunaj lernantoj mi ĉiam diras : imitu mian ekzemplon ! Fabriku vian vortaron mem ! Prenu malnovan, naci-lingvan vortaron. Kraĵone vi enmetos la de vi ellernitajn esperanto-vortojn en tiun vortaron. Supertlua laboro estas, ankaŭ noti tiujn vortojn, kiujn vi jam memorfiksitis. Mi persone enskribis post mia esperantiĝo eĉ nur vortojn, kiujn mi kiel specialaj taŭgajoj aparte gustumis. Tiel vi havigos al vi originalan vortaron laŭ via persona gusto. Neta vero ja estas, ke ĉiu home havas apartan personecon. El ĝi vi ne povas eltordi ion, kion en ĝi ne enestas !!! Se vi perfortas vian personecon, t. e. ensorbi en si ion esence fremdan, la sekvo certe estos : timo ĉe interparolado.

Do, posedante ĉi tiun vortaron, okazos mirakle : vi fariĝos « vivanta » vortaro.

Vi ne kredas ? Kaj mia personeto ? Mi ne plu bezonas vortaron. Mi forbruligis la memfaritan ! Kaj nun mi diras ion, kio verŝajne havigos al vi iometan kapturiniĝon :

Kiu sincere deziras, fariĝi krom teoria esperantisto ankaŭ parolanta mondlingvano, devas koni la virton de plena dezirmalhavemo. Jes, pro tio la listo ! Mi malkovris la Esperantistojn, kiujn ornamas ĉi tiu virto.

Kion mi ĝis nun faris, estas nur etapo sur la longa, longa vojo. Ĉar mi iam ja faros ion per la listo; pri tio mi estas certa ! Estas ia voĉo en mia interno, kiu ĉiam avertas min pri tio, ĉu pliaj paŝoj estas fareblaj. Ne ĉiam mi sukcesis. Oftfoje mi seniluziiĝas; tiam mi faras paŭzeton. Oftfoje okazas io, kio agitas nian emocion tiel, ke ni devas fari halteton. Ho, esperanto havas ion en si, kiu daŭre surprizas nin. Ĉiam zorgu, ke ne la lingvo regas vin, ne, tute ne, centfoje ne ! Zorgu, ke vi mem estru la lingvon Esperanto.

Unu sinjorino demandis, kial mi ne aldonis aliajn nomojn al la listo. Nu, mi ne trovis aliajn nomojn. Por mi la ĉefcelo de Esperanto ankoraŭ estas vualata per vualoj de nescio. Tre malrapide estas la ritmo, laŭ kiu ni eniras la landon, kiun oni nomas : Esperantujo. Persona difekto mia ankaŭ estas, ke mi estas terure specialgusta viro. Pro tio ni preterlasu la kompletigon de la iamkonata listo en la turo.

Tiel mi parolis. Kaj kiam la sinjorinoj kantis la belajn vortojn de nia himno, estis larmoj en multaj okuloj.

Kaj nun alvenis la tempo, ke mi por la unua fojo publikigas la 50 nomojn de la stranga listo :

JAM! de Ch. Baudelaire.

Cent foje la suno estis ŝprucinta, radia aŭ ĉagrena, el tiu senlima kuvo de la maro kies bordoj sin lasis apenaŭ percepti; cent foje ĝi estis remerginta sin en sian senliman vesperan banon. De multo da tagoj ni povis admiri l' alian flankon de la firmamento kaj deĉifri la ĉielan alfabeton de l' antipodoj. Kaj ĉiu pasaĝero ĝemadis kaj grumblis. Oni estus dirinta ke la proksimiĝo de la tero incitas ilian suferon. « Kiam do, » ili diris, « ĉesos ni dormi dormon skuatan de l' ondoj, ĝenatan de vento kiu ronkas pli alte ol ni ? Kiam povos ni manĝi viandon kiu ne estas tiel sala kiel la elemento kiu nin portas ? Kiam povos ni digesti en fotelo senmova ? »

Estis iuj kiuj pensis pri sia familio, kiuj bedaŭris siajn edzinojn malfidelajn kaj malĝentilajn, kaj sian idaron krieman. Ĉiuj tiel frenezigiĝis pro la bildo de la tero foresta, ke ili estus, mi kredas, manĝintaj herbon pli entuziasme ol la bestoj.

Fintine rando estis signalita; kaj ni vidis, alproksimiĝante, ke estis tero belega, helluma. Ŝajnis ke la muzikoj de la vivo foriĝis de ĝi en konfuza murmuro, kaj ke tiuj marbordoj, riĉaj je verdaĵoj de ĉiu speco, ellasis, ĝis pluraj mejloj, agrablegan odoron de floroj kaj de fruktoj.

Tuj ĉiu estis gaja, ĉiu abdikis sian malbonhumoron. Ĉiuj kvereloj estis forgesitaj, ĉiuj plendmotivoj estis pardonitaj, la deciditaj dueloj estis strekitaj el la memoro, kaj la venĝemoj forflugis kiel fumo.

Mi sola estis malĝoja, nekoncepteble malĝoja. Simila al sacerdote, de kiu oni forprenis lian diaĵon, mi ne povis, sen aflikta amaro, foriĝi de tiu maro tiel monstre alloga, de tiu maro tiel infinite varia en sia terura simpleco, kaj kiu ŝajnis enteni en si kaj figuri per siaj ludoj, siaj mienoj, siaj koleroj kaj ridetoj, la humorojn, la agoniojn kaj la ekstazojn de ĉiuj animoj kiuj vivis, kiuj vivas kaj kiuj vivos !

Adiaŭante tiun nekompareblan belon, mi sentis min deprimita ĝismorte; kaj tial, kiam ĉiu el miaj kunuloj diris : « Fine ! » mi povis nur krei « Jam ! ».

Tamen estis la tero, la tero kun siaj bruoj, siaj pasioj, siaj komfortoj, siaj festoj; estis tero riĉa kaj belega, plena de promesoj, kiu sendis al ni misteran parfumon de rozo kaj de mosko, kaj de kie la muzikoj de la vivo venis al ni en amora murmuro.

Esperantigis : Teo Ken (El « Le Spleen de Paris, XXXIV »).

1. G. Avril; 2. W. Baaten; 3. Julio Baghy; 4. C. Bailey; 5. D. Bartosik; 6. F. J. Belinfante; 7. E. Baranyai; 8. Jean Borel; 9. H. Boucon; 10. F. W. Buenting; 11. H. J. Bulthuis; 12. M. C. Butler; 13. Andreo Cseh; 14. G. J. Degenkamp; 15. Roland Dupuis; 16. Frans Van Dooren; 17. Stellan Engholm; 18. F. Faulhaber; 19. Irène Fink; 20. Karl Froding; 21. J. A. Gill; 22. Julius Glück; 23. W. Grolleman; 23. S. Guterman; 24. P. Heilker; 25. Julia Isbrücker; 26. S. S. de Jong Jr.; 27. ĉina instruisto Houchio; 28. K. Kalocsay; 29. L. Korinna; 30. P. Korte; 31. E. Lanti; 32. N. H. C. Macpherson; 33. Frato Monulfus; 34. O. T. Nicolaisen; 35. P. Petit; 36. Edmond Privat; 37. J. H. Roosdorp; 38. Raymond Schwartz; 39. Karl Söderberg; 40. Anakron Stamatiadis; 41. A. G. J. van Straaten; 42. Petro Stojan; 43. F. Szilagy; 44. Jakob Schmid; 45. Karl Vanselow; 46. Hector Vermuyten; 47. R. F. Vaughan; 48. August Weide; 49. Bas Wels; 50. L. Woudenberg.

Speciale verkis por Fl. E., Carl Franzmann, Groesbeek (N.).

La redaktoro de « La Granda Familio ».



DEMOKRATO PRI LA EVOLUO DE ESPERANTO.

Dum multaj tagoj kaj noktoj, mi cerbumis por naski ĉi tiun artikolon. Ĉie, ĉu en la laborejo, ĉu en la lito, ĉu sur la stratoj, la ideoj, en belaj formoj, moviĝis en mia kapo, sed, oh ve! kiam mi prenis skribilon kaj paperon por konkretigi tiujn ideojn, ŝajnis ke mi havas truon en mia kapo, tie kie devus troviĝi la cerbo. Kiel la fumo de mia cigaredo, kiu pro la varmego de la forno, kirle suprenleviĝas plafonon, ankaŭ miaj ideoj pendiĝis tie, nekaptablaj.

En la 11-a numero (Nov. 1939) de « Flandra Esperantisto », nia kompetenta S-ano Van Dooren akre metis la problemon : « Kien Esperanto? ». Koncize li skizis la tezojn de la antagonistoj, kiujn li klasifikas en tri kategoriojn : la konservativuloj, la demokratoj kaj la progresistoj. Li mem ne prenis pozicion.

Ni, kiuj apartenas al la granda amaso, la t. n. demokratoj, ne timas prezenti nian sintenon. Tute pravas la verkisto de la artikolo rilate al la konservativuloj : Esperanto ne povas resti sen evoluo, ĉar ankaŭ la latina lingvo ne evoluis kaj... estas nun morta lingvo.

Niaj kontraŭuloj estas la progresistoj. Se ni sekvus la vojon, kiun ili volas al ni direkti, Esperanto ne plu estus mondlingvo. Kaj nia majstro Zamenhof ne verkis la lingvon por la t. n. « elito ». Li celis pli altan, pli humanan idealon : li volis la interfratiĝon de ĉiuj homoj, ĉu kleraj, ĉu malkleraj; ĉu riĉaj, ĉu malriĉaj.

S-ano Van Dooren prave skribis ke jam nun, de diversaj flankoj, oni plendas pri la neologismoj, kiujn oni trovas en la last-aperintaj verkoj. La dika vortaro, kiun ni posedas, ne plu sufiĉas! Baldaŭ ni povos ĝin kompari al la angla vortaro, kaj kiu povus nin riproĉi, se en tiu okazo, ni volus anstataŭi Esp.-on per la angla lingvo, ĉar ni havus grandan avantaĝon : dum ke la Esp.-istaj adeptoj nombras ekz. 500.000, la angla lingvo nombras ilin per multdekoj da milionoj!

Kie ni povas trovi la progresistojn? Ni notas ilin precipe inter la verkistoj kaj la poetoj. Ili plendas ke la nuna stato de Esperanto ankoraŭ malhelpas al ili esprimi iliajn ideojn. Ili premesu al ni la jenan rimarkon : Esperanto enhavas idealon, kiun certe ili konas. Tie la vojo troviĝas. Ke la lingvo ĝis nun ne ankoraŭ taŭgas por iliaj bela literaturo kaj belaj rimoj, certe ankaŭ ni bedaŭras, sed tio ne tiel multe gravas, kiel la atingenda celo. Se la progresistoj ne konsentas pri tio, ili ne estas Esperantistoj, ĉar ili kontraŭstaras la « ideon » mem de la lingvo, verkita, mi ripetas, por ĉiu. Ili iĝis egoistoj, kiuj uzas la lingvon nur pro plezuro aŭ eĉ pro « snobismo », sed ili forgesas ke trudante sian direkton ili malhelpas la plimulton de la homaro (t. e. la laboristaro) lerni tiun lingvon, kies facileco estas la vera kaj sola rimedo por permesi ĉi-lastajn akiri tiun ilon de interkompreno.

Iuj respondos ke ili, la progresistoj, jam laboregis por la movado kaj havas nun la rajton ĝui la fruktojn. Certe respektplene ni salutas ilin pro la farita laboro, tamen ili eraras, se ili opinias ke la farenda laboro estas farita. Ĝis Esperanto estu oficialigita kaj akceptita kiel unua lingvo post la nacia, restos daŭra lukto, kaj ni devas laboregi kaj peni por atingi

ĉi tiun fincelon. Poste venos la ripozo, kaj la progresistoj trankvile povos pripensi ĉu ni bezonas Esp.-an lingvon, kiu permesos komplikajn belajn literaturon kaj rimojn.

Ĉu ĉi tiu fincelo estas utopio? Kial? Antaŭ multaj dekjaroj, kiam Zamenhof ne ankoraŭ aperigis sian lingvon, la tutan ideon de monda helplingvo oni rigardis kiel utopion. Tamen Esperanto nun estas parolata tra la tuta mondo! Plue, ĉu ni ne estas Esperantistoj, t. e. optimistoj?

H. d. R.

« TUTMONDA MOVADO » POR ĈIUIJ HOMOJ.

Ĉiu esperantisto, kiu serioze studis la « Vivo de Zamenhof » aŭ « Originala Verkaro » scias, ke Zamenhof krom sia laboro por la Esp.-movado ankaŭ laboris por alia tutmonda movado, en kiu li propagandis siajn privatajn ideojn kaj principojn. Multfoje li klopodis interesigi la esperantistojn por tiu movado, sed estis prekaŭ vana laboro, ĉar la tempo ne estis matura por tiaj idealoj. Eĉ antaŭ la Pariza kongreso (1914) li faris ĉion por akiri fak-kunsidon pri la « Homaranismo », tiel d-ro Zamenhof nomis sian idealon. Sed intertempe la mondmilito eksplodis kaj li devis, dumvoje al la kongreso, forkuri hejmen. Tamen li persistis. Eĉ en decembro de la jaro 1916-a li pensis pri la aranĝado de kunveno pri homaranismo en Svisujo. Al ĝi li invitus profesorojn ekster kaj en la Esperanto-movado. Li pretigis cirkuleron, anoncanta, ke la kunveno okazos en la lastaj tagoj de decembro 1916. Tamen la milito daŭris. Sur la manuskripto li poste trastrekis la daton kaj skribis ŝanĝe : « en la unuaj tagoj de aŭgusto 1917 ». La milito daŭris. Denove li korektis la daton kaj skribis : « post la finiĝo de la milito ». Ĉu ne estas tragedie?

La 12-an de aŭgusto 1939 en Tervuren, post 25 jaroj, finfine la Esperantistoj fondis la movadon, al kiu d-ro Zamenhof sopiregis dum sia tuta vivo. Kaj eĉ nun ĝi naskiĝis kun multaj doloroj. Tamen, por disvastigi la Zamenhofajn idealojn ni nepre bezonas fortan kernon de Esperantistoj, ĉar ĝi estas mondmovado, kaj kiel unuigilon ni bezonas Esp-on.

Por plene kompreni kaj propagandi « Tutmonda Movado » estas nepre necese, ke vi studu « La Vivo de Zamenhof ». La anoj de « T. M. » klopodas, kompreni kaj respekti ĉies pensmanieron kaj ne ataki aliajn homojn, eĉ ne se oni atakas ilin.

Ĝi estas necese, pli ol iam, ke la principoj de d-ro Zamenhof estu konataj en la tuta mondo.

Ĝi estas la sola movado, kiu povas detru la militon. Ni havas la taskon ankoraŭ pli neŭtraliĝi la ideojn, por ke ĉiu povu aliĝi al T. M. kaj por ke ni povu propagandi ĝin en ĉiuj landoj. Precipe la tutmonda junularo estas preta por konstrui novan mondon sur la idealoj de d-ro Zamenhof. Ĝi ricevis la plej belan, la plej fortan, la plej veran kaj la plej sekuran idealon, kiu iam naskiĝis, ĉar ĝi estas bazita sur la amo.

Ĉion, kion la nova mondo bezonas : toleremon, amon, sincerecon, saĝon donos la « Zamenhofismo ». La scienco, arto kaj literaturo vaste disvastiĝos tra la tuta mondo kaj kreas novajn eblecojn. Ni sentos nin iom post iom eta parteto de la tuta mondo kaj sentos nin respondecaj por la nuna mizerego.

D-ro Zamenhof donis al ni la praktikan solvon por interfratigi ĉiujn homojn kaj per tio li solvis la hodiaŭnan mondproblemon.

E. van Veenendaal-Bouwes,

Redaktorino de « La Juna Vivo », Limmen (N. H.)



IETS OVER WERKWOORDEN.

Betreffende werkwoorden stelt men zich vaak de vraag : waarom is dit werkwoord overgankelijk en dat onovergankelijk? Zou het niet evengoed andersom kunnen zijn? Heeft Zamenhof niet willekeurig gehandeld, door bijvoorbeeld **pendi, iri, sidi, kuŝi** als onovergankelijke werkwoorden te beschouwen en **ruli, movi, ŝanĝi, turni** als overgankelijke?

We gelooven, dat Zamenhof ook hierin welbewust heeft gehandeld, alhoewel enkele gevallen misschien ook niet geheel zonder invloed van zijn nationale taalgevoelens gebleven zijn. We kunnen namelijk constateeren, dat Zamenhof het al of niet overgankelijk-zijn van een werkwoord meestal aan het karakter van dat werkwoord heeft bepaald. Dit blijkt o. m. uit drie groepen werkwoorden, die men duidelijk naast elkander kan onderscheiden :

- 1° werkwoorden, die een toestand of houding uitdrukken; zij zijn onovergankelijk (**stari, sidi, kuŝi, kaŭri, pendi**);
- 2° werkwoorden, die een beweging zonder verplaatsing uitdrukken; zij zijn overgankelijk (**movi, turni, ŝanĝi, rompi, klini, fleksi** enz.);
- 3° werkwoorden, die een beweging met verplaatsing uitdrukken; zij zijn onovergankelijk (**iri, marŝi, veturi, flui, fali, pasi, paŝi**).

Het schijnt zelfs, dat de gebruiker onbewust deze ordening aanvoelt; en waarschijnlijk is daaraan de oorzaak toe te schrijven van het feit, dat beginners sommige werkwoorden als **ruli, sterna, etendi** vaak verkeerdelijk in onovergankelijke zin toepassen. Deze werkwoorden, immers, zijn wel werkwoorden van beweging, als zoodanig onder te brengen bij groep 2, maar omdat die beweging vaak niet zonder verplaatsing gepaard gaat, schikt men zoo'n werkwoord onbewust onder groep 3, welke werkwoorden onovergankelijk zijn.

Men verwondere zich dus niet te spoedig over hetgeen Zamenhof bepaald heeft, maar ga in alle twijfelgevallen na, of de auteur van Esperanto geen reden heeft gehad zoo en niet anders te handelen!

Eén geval is er, dat onze zorgvuldige opgebouwde theorie bijna zou doen ineenstorten. Het werkwoord **fumi**, namelijk, is oorspronkelijk beslist onovergankelijk. Het is zoo nauw verwant aan het eveneens onovergankelijke **bruli**, dat men **bruli** in misschien alle gevallen door **fumi** vervangen kan.

Maar daarnaast heeft **fumi** een andere beteekenis, die weer beslist overgankelijk is : **fumi cigaron, pipon**. Wil men geen uitzondering op de regel toelaten, door **fumi** zoowel over- en onovergankelijk te noemen, dan blijven er drie mogelijkheden als oplossing over.

1° Men neme een overgankelijk **fumi** als basis en vorme daarvan **fumiĝi** voor de onovergankelijke beteekenis : **la cigaro fumiĝas, la forno fumiĝas**.

Hoewel **fumiĝi** niet geheel onbekend is (**la vulkano rekomencis fumiĝi**), lijkt ons deze oplossing toch niet aan te bevelen. Het is een inbreuk op het onovergankelijke karakter van het aan **bruli** verwante **fumi**.

2° Men neme het onovergankelijke **fumi** als basis en gebruike **fumiĝi** voor : **li fumigas cigaron, pipon**.

Ook deze oplossing komt ons minder gewenscht voor, zij het dan alleen, omdat het welhaast onmogelijk is een zoo algemeen gebruik van **fumi** in : **fumi cigaron**, door **fumiĝi** te vervangen.

3° Een andere oplossing zou zijn aan **fumi** twee geheel van elkaar gescheiden beteekenissen te hechten : een onovergankelijk rooken van brandende of smeulende stoffen of voorwerpen (**cigaro, pipo, kameno, vulkano, brulanta domo fumias**) en een overgankelijk rooken van tabak (**fumi cigaron, cigaredon, pipon**).

Men moge het eveneens een uitzondering op een regel noemen, dat één woord twee beteekenissen heeft; de regel « één woord, één beteekenis » heeft practisch geen zin meer; men vergelijkte hiermee slechts de verschillende beteekenissen der woorden **radio, artikolo, ĉambro, kamero** e. v. a.

Ook « Plena Vortaro » gaat in die richting, getuige het feit, dat **fumi** niet, zooals vele andere werkwoorden, met x (= tr. en intr.) verklaard is, maar het woord tweemaal genoemd is, als onovergankelijk én als overgankelijk werkwoord.

Laten we hier nog aan toevoegen, dat volgens U. V. de stam **fum'** niet werkwoordelijk, maar zelfstandig is, zoodat **fumi** slechts een afgeleid werkwoord is. Dit feit mag er ons op voorbereiden, dat onder de afgeleide werkwoorden meer dergelijke moeilijkheden voorkomen. Zulke werkwoorden kunnen we echter in een afzonderlijk hoofdstukje behandelen, evenals de twijfelgevallen, die zich voordoen in het al of niet gebruiken van het achtervoegsel **igi** (**ordi** of **ordigi, publiki** of **publikigi, motivi** of **motivigi** enz.).

DE STIJL, F. Faulhaber.

Een behoorlijke stijl is allereerst een zaak van welluidendheid. Het geschrevene moet kunnen worden voorgelezen. Daarom moeten de woorden en zinnen gemakkelijk vloeien. Zij moeten in de uitspraak geen bijzondere moeite vergen. Ook dient in samengestelde woorden het samentreffen van bepaalde klanken, waar dit leelijk klinkt, onduidelijkheid veroorzaakt of tot misverstand aanleiding geeft, zooveel mogelijk te worden vermeden, b.v. :

urbplaco (urboplaco; urba placo); — **peceĝglacio** (pecega glacio); — **fokkaptado** (fokokaptado; kaptado de fokoj); — **sorbpapero** (sorba papero); **gorĝŝire** (gorĝoŝire); — **studtempo** (studotempo); — **leglibro** (legolibro); — **lasttempe** (lastatempo); — **provflugoj** (provoflugoj); — **provvojaĝo** (provovojaĝo); — **freŝsanga** (freŝasanga); — **fiŝsupo** (fiŝa supo; fiŝosupo); — **rabbesto** (raba besto; rabobesto); — **poŝspeguleto** (poŝa speguleto); — **flugkapablo** (flugokapablo); — **pluvfalo** (pluvofalo); — **ĉerizsuko** (ĉerizosuko; ĉeriza suko); — **ovforma** (ovoforma); — **manĝajzorgo** (zorgo pri manĝaĵo); — **venĝsento** (venĝosento); — **nigrhara** (nigrahara); — **sorĉŝanĝi** (sorĉe ŝanĝi); — **lavvazo** (lavovazo); — **de l'libro** (de la libro); — **mirrigardi** (mire rigardi); — **nevnjo** (nevinjo); — **profitdona** (profitodona); — **sublima** (sub la limo); — **plugkampo** (plugokampo); — **ŝarĝĉevalo** (ŝarĝoĉevalo); — **atendĉambro** (atendejo); — **mortĝermo** (mortĝermo); — **larĝsultra** (larĝasultra); — **ludtumulti** (lude tumulti); — **dancsalto** (dancosalto, danca salto); — **bridteni** (bride teni); — **riĉsukcese** (kun riĉa sukceso); — **lingvekzerco** (lingva ekzerco); — **l'avo** (la avo).

Dergelijke « caramboles » van klanken ontstieren de stijl. Blijven zij in een boek tot enkele beperkt, dan is het niet erg. Maar ongenietbaar wordt de stijl als er een opeenhooping ontstaat. — El « La Progresanto ».



ESPERANTO-EKZAMENA KOMITATO EN FLANDRUJO.

Adreso : Scheepslouwersstraat 219, Gent.

PROGRAMO DE LA EKZAMENOJ.

A. — Por akiri la diplomon A, la kandidato kapablu :

SKRIBE :

- a) Traduki simplan Nederlandlingvan tekston en Esperanton.
- b) Traduki simplan Esperanto-tekston en Nederlandan lingvon.
- c) Noti mallongan diktaton.
- ĉ) Fari mallongan redaktaĵon.

PAROLE :

- d) Voĉlegi simplan Esperanto-tekston, ĝin traduki, respondi je kelkaj demandoj rilataj al la gramatiko uzata en la legitaĵo.
- e) Fari simplan interparoladon en Esperanto.
- f) Iom koni pri la Esperanto-movado kaj -historio.

B. — Por akiri la diplomon B, la kandidato kapablu :

SKRIBE :

- a) Traduki fragmenton de iu Esperanto-verko aŭ eksterlanda Esp.-revuo.
- b) Traduki Nederlandlingvan tekston en Esperanton.
- c) Verki redaktaĵon en Esperanto. Por tio li elektu inter ses temoj.
- ĉ) Noti diktaton.

Por la PAROLA parto, la kandidato :

- d) Konu la literaturon, kaj estu trastudinta almenaŭ tri Esperanto-verkojn (krom la « Fundamenta Krestomacio ») inter kiuj unu de D-ro Zamenhof — kaj 2 aliaj, elektotaj inter fiksitaj verkoj. Li sciu respondi je demandoj pri la enhavo, kaj simplaj demandoj rilataj al la stilo (vortsinsekvo, verkmaniero, uzado de vortoj ktp.) en la legitaĵo.
- e) Havu scion pri la historio kaj la movado de Esperanto.
- f) Estru komplete la gramatikon de Esperanto kaj klare klarigu en Nederlanda lingvo.
- g) Facile kaj korekte parolu Esperanton.

La Ekzamena Komitato funkcios ĉie en Flandrujo kie almenaŭ 10 kandidatoj sin prezentos.

Por ĉiuj pluaj detaloj sin turni al nia deligito S-ro Roose.

NOTO. — La tri trastudendaj Esp.-verkoj por la diplomo B devos esti prenita el listo fikso de la Ekzamena Komitato. Ni esperas baldaŭ ricevi tiun liston por publikigi en nia revuo.

Intertempe ni forte konsilas jam al niaj sekcioj organizi kursojn pri la historio de la Esp.-movado. Taŭgaj verkoj pri tiu temo estas haveblaj ĉe Fl. E. I., P. Van Humbeekstraat 3, Bruselo.



BELGIE. — Velen zijn mogelijk reeds in verbinding getreden met de Internationale Vereeniging Bellamy, of hebben minstens reeds de naam gehoord van deze vereeniging tot het inrichten der moderne samenleving. Nu stellen wij vast dat de propaganda hier ten lande gevoerd wordt ook door middel van Esperanto. Wij laten ons niet uit over de werking, noch doel, terloops stippen wij slechts aan het groote werk dat als de fundamenteo van deze strekking aanzien wordt, namelijk « Looking Blackward » van Edward Bellamy, stichter van dit streven, en dat ook in Esperanto vertaald werd : « Rigardante Malantaŭen ». De belangstellenden wenden zich tot de Int. Ver. Bellamy, R. Rinskopilaan 44, te Gentbrugge.

BRAZILIE. — Dat de Braziliaansche regeering een groote steun is voor de Esperantobeweging bewijst nogmaals 't volgende : Ter gelegenheid van de eerste postzegeltonoonstelling der jeugd te Bello-Horizonte, hoofdstad van Minas-Geraas, werd een bijzondere stempel vervaardigd waarvan wij hier een afdruk geven :

UNUA JUNECO	★	B. HORIZONTE
EKSPOZICIO		BRAZILIO
FILATELIA		1939 — Junio

CHINA. — Voor de verzamelaars van zichtkaarten kunnen wij volgend nieuws mededeelen om hun schat te vergrooten :

Een reeks van 14 gedrukte prentkaarten van het hedendaagsche China met Esperanto-verklaringen zijn te bekomen bij : « Voĉoj el Oriento », P. O. Box No 1732, Hongkong, Azio, tegen den prijs van 1 resp. kup.

Wilt U medewerkers aan een menschlievende zaak ter opbeuring van de gekwetste Chineesche soldaten, alsmede der Japaneesche krijgsgevangenen ? Heel eenvoudig : zendt aan onderstaand adres een zichtkaart of prentkaart, de zeden of gebruiken van uw streek afbeeldend, met geschreven groet op de achterzijde in Esperanto. Deze verzameling zal dienen tot het inrichten eener tentoonstelling voor voornoemde gekwetsten en gevangenen. Uw groet zal in het Chineesch of Japaneesch vertaald worden en valt als dusdanig in het kader der Esperantogedachte. Uit dankbaarheid zal U een mooie zichtkaart teruggezonden worden. Schrijf aan volgend adres : S-ro Yeh Kangyu, Kincheng Banking Corp., Nan Sing Kai, Chengtu, Szechwan Province, Cinio.

ITALIE. — Turijn stelt ter beschikking der toeristen een schoon vouwprospectus met vele illustraties. Buiten een inleidend woord over de geschiedenis vermeldt het ook enkele inlichtingen over de Esperantobeweging ter plaatse met de woonplaatsen der Esperantisten; dit alles in de hulpwereldtaal. Kosteloos verkrijgbaar bij « Ente Provinciale per il Turismo, Torino ».

Nog iets voor onze toeristen. De Italiaansche toeristenkronijk geeft een wekelijksch bulletijn uit handelend over toeristenaangelegenheden in Italië. Deze gedrukte uiteenzetting gaat gepaard met de regelmatige radiouitzendingen. Voor deze wenschen dit wekelijksch bulletijn kosteloos te ontvangen volstaat het aanvraag te doen aan Radio Turismo, Via Vittorio Veneto nr. 62, Roma, en duidelijk naam en adres op te geven (liefst met schrijfmachine of in drukletters).

Zonder tot reklaam over te gaan geven we graag kennis van een omzendkaart die we onder de hand hebben, van « La Kosmopolita Esperanto-Fenikso ». Deze instelling is voortbrenger van hakken voor dames. Voor alle briefwisseling richt men zich tot Paulo Bossi (plaatselijke Esperanto-afgevaardigde) of rechtstreeks tot de firma « K. E. F. », Via Torre nr. 1, Parabiago (Milano, It.). Alle briefwisseling geschiedt uitsluitelijk in het Italiaansch of in de wereldtaal Esperanto.

Nogmaals een bewijs van de degelijke waarde onzer internationale taal.



bibliografio

Duope ricevatajn verkojn ni recenzas, unuope ricevatajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al alia adreso ol la redakcia, estos ignorataj. Ĉiuj libroj estas acetebblaj ĉe Fl. E. I.

PASOJ ĈE PORDEGOJ. Dramo ag Bernardo Ojasono. — Eldono de la aŭtoro B. Ojasson, Haimre as. pg. 11. Marjamaa, Estonio. Tri libretoj : 76 p.; 13×19,5 cm. Prezo ne montrita.

Supran kvaraktan dramon... lingvan « ag » Ojasono ni nur rekomendas al la divenemaj fervoruloj de la « serĉ-angulo » en ĉi tiu revuo kaj al la kolektantoj de lingvaj kuriozaĵoj...

La aŭtoro per neologisma lavango ŝajnas adapti Esperanton al la politika aktualeco de la temo kaj precipe inspirita de nia « bele logika gramatiko » ŝajnas nur obei

- » al ord' reĝoa
- » k' ordon' Diaa »

« k'do » atentis nek la « ordonon » de la prudento, nek la « ordon » en nia komuna lingvo, eĉ ne la belsonecon (k'koaglas). Li krome sisteme eluzas la Grabowski-licencon pri la verbaj finaĵoj :

- » La estro
- » al l' garnizono
- » u en la salono. »

kio en kombino kun lia eliziita « kaj » nin malavare povas beni per... « kaso » kaj eĉ « kisoj ».

Entute estas konstatinde, ke sekvante ekstertradiciajn vojojn, la verkinto per konfuza, fantazia solvo (?) de iuj t.n. gramatikaj problemoj, mem elpruas « ab absurdo » ke tiuj problemoj fakte... ne estas problemoj. Do nenio malhelpas S-ron Ojasonon verki sian versan dramon (kies enhavo eble estas valora) ankaŭ... en Esperanto. Nun estas tempo, peno kaj mono perditaj.

TYN.

(Daŭrigo de p. 27.)

FRANKRIJK. — In plaats van « vermindering voor de kroostrijke gezinnen » zijn het ditmaal ook de Esperantisten die deze gunst genieten en wel : « Au Bon Marché » te Parijs, die volgend reklaam plaats : « Je egala prezo, supera kvalito, ĉiu Esperantisto ĝuas rabaton! ».

Bij besluit van 7 Juni 1939 laat het Ministerie van Nationale Verdediging en Oorlog aan de militairen van het actief leger toe, lid te worden van de « Société Française de l'Esperanto », rue de Chabrol, 34, Parijs.


JOEGOSLAVIE. — Niettegenstaande de moeilijke oogenblikken geeft de Esperanto-beweging in dit land ons een schitterend voorbeeld.

Aan de kursussen ingericht door A. E. K. te Zagreb nemen op dit oogenblik meer dan 140 personen deel. Ook door L. E. S. werden enkele kursussen ingericht, alsmede door andere groepeerings en in enkele scholen; zoodat in totaal te Zagreb op dit oogenblik ongeveer door 500 leerlingen de lessen bijgewoond worden.

NEDERLAND. — Op het internationaal paedagogisch kongres dat gehouden werd in April 1936 te Utrecht, met als onderwerp « Leren samen-leven », werd verklaard door den Voorzitter, den Heer Kees Boeke, dat het taalverschil groote moeilijkheden veroorzaakte die men had kunnen vermijden, indien alle bezoekers Esperanto verstonen. Hij meldde verder dat in zijn school te Belthoven, Esperanto als verplicht leervak zal worden ingevoerd.

Zonder kommentaar.

Wist U dat in Gaasterland reeds 6 spijshuizen hun spijkskaart ook in Esperanto opstellen, ten gerieve der vreemdelingen. Gaarne vermelden wij hier de namen dezer hotels : « Hotel Boonstra » en « Hotel Teernstra » te Balk; « Hotel Jans » te Rijs; « Hotel Rijsterbosch »; « Hotel Boschlust » te Oude Mirdum; « Lunchroom Gaasterland » te Fijs.



ESPERANTO KAJ LA MILITO.

BELGA ESPERANTISTO (Belgujo). — La grupa vivo en diversaj el niaj sekcioj iĝis ankaŭ malfacila, pro la foresto de bonaj kunlaborantoj, pro la malfacilaĵoj pri konvenaj ejoj, ktp. Sed tio ne malhelpas, ke la eldonado de la revuo estos daŭrigata. Ĉio dependos de la okazantaĵoj, de la cirkonstancoj, kaj ankaŭ, ni ne forgesu, de nia propra volo, de nia propra laboro.

BRITISH ESPERANTIST (Britujo). — Rilate al ni mem, la estonteco estas ankoraŭ vualita. Tute certe la Asocio povos daŭrigi la eldonadon de ia organo, sed sendube ĝi devos esti tre malampleksa kompare kun la ĝisnuna gazeto. Decidote estas ankaŭ, ke ĝi aperu ĉiumonate, aŭ nur unufoje en du monatoj. Dum la mondmilito de 1914-1918 nia organo aperadis ĉiumonate sen interrompo, kaj espereble ĝi povos tiel aperadi dum la nuna nigra periodo; la cirkonstancoj estas tamen tiel malsamaj, ke komparo jam multrilate montriĝis erariga.

Intertempe ni povas esperi ke niaj samideanoj en la neutralaj landoj daŭrigos la laboron...

DANSK ESPERANTO-BLAD (Danujo). — Kia estas la sorto de Esperanto nun? Ĉu ĝi mortos? Ne timu, Esperanto neniam mortos, ĝi jam travivis grandan mondmiliton. Ni multobligu nian energion, ni devas subteni nian movadon ne nur per nia laboro, sed ankaŭ mone. Ĉefe ni zorgu, ke nia dana movado estu modela en ĉiuj rilatoj. Kaj ni povas esti certaj, ke niaj samideanoj en militantaj landoj penados por en okazo de bezono atentigi pri la utilo de Esperanto.

ESPERANTOBLADET (Norvegujo). — Estos nun la devo de la Esperantistoj en la neŭtralaj landoj — kaj unuavice de tiuj en Norvegujo — gyidi nian movadon tra la mallumaj tempoj kiuj nun komenciĝas. Kaj ni sukcesos fari tion — pri tio mi ne dubas.

FLANDRA KATOLIKO (Flandrujo). — Eble iuj el niaj abonantoj timis ke ni ne plu aperos. Ni povas ilin kvietigi...

FRANCA ESPERANTISTO (Francujo). — Ni insiste petas ĉiujn prezidantojn kaj sekretariojn de niaj grupoj daŭrigi la vivon de la organizaĵoj pri kiuj ili konsentis respondi. Nia movado devas trapasi tra la milito senperda, por ke ĝi povu larĝe disvastiĝi dum la unuaj tagoj de la paco retrovita, en mondo kiu fine komprenos, ni esperas, la maldignegecon de tiuj organizataj mortigoj, kie la homo ne eĉ atingas la moralan nivelon de la besto, kaj utiligas sian mizeran potencon nur por detruo kaj morto.

HEROLDO DE ĈINIO (Ĉinujo). — Pro la sinsekva kaj sendistingaj bombardoj al Chungking fare de la japanaj aviadiloj, la registaro ordonis evakuon de loĝantoj kaj organizoj. Ni translokis nian kompostejon al vilaĝo kelkdek km. for de la urbo. Por rearanĝi ĉion, tute kontraŭvole ni devis ĉesigi la aperon de nia gazeto dum Julio kaj reaperigi la nunan n-ron ekde la aŭgusto.

LABORISTA ESPERANTISTO (Nederlando). — La kongreso de F. L. E. nepre okazos, almenaŭ se perforto ne ĝin malebligos. Guste nun, ni laboristaj Esperantistoj okupu niajn postenojn.

NEDERLANDA ESPERANTISTA (Nederlando). — Geamikoj, mi nepre ne kuraĝus menci en ĉi tiu artikolo la forton de nia movado, se mi ne sciis, ke ni laboris kaj laboras por bona, por sankta afero! Ĉar ĝi estas bona kaj sankta, ni ne povas forlasi ĝin, sed ni laboros! La tuta mondhistorio instruas al ni, ke neniam per unu klopodo oni atingis ion bonan, ke ĉiam la vojo al la luma supro, kiun ni volas atingi, kondukis la homaron tra abismoj kaj mallumo.

RENOVIGO (Meksiko). — Nenio ŝanĝigos nian ĉiaman pozicion : Amikeco por ĉiuj popoloj.

SVENSKA ESPERANTO TIDNINGEN (Svedujo). — Post traktadoj inter la baltaj Esp-organizoj estas decidite ke okazos Esp-konferenco en Stokholm dum 14-18 julio 1940...



ANTVERPENO. — « Flandreina Grupo E-ista ». — Kiel anoncita en la antaŭen numeron nia sekcio denove regule kunvenas ĉiun merkredon je la 8 1/2 horo vespere. La 30an de decembro ni havis nian intiman Kristnaskan feston, kiu, dank' al la laboremo de nia festdirektoro tre sukcesis. La 10an de Januaro, dum nia jarkunsido, la duono de la estraro, t. e. Prezidanto, 2a sekretario, kaj Festdirektoro estis unuanime reelektitaj. Ĉu pruvo de la unueco de la grupanoj? Ni esperu, ĉar, post sufiĉe malkvieta periodo, ni nepre bezonas glatan kaj amikan kunlaboron. La financa situacio de la « Flandreina » kvankam ne brila, estas tamen tute en ordo kaj ni estas certaj ke nia kara kasisto, kiel antaŭe, zorgeme arangos la financon aferon de la grupo. Pere de niaj anoj, S-ro Van Gindertaelen, kiel Prezidanto kaj S-ro Van Dooren, kiel ĉefredaktoro; nia sekcio estas denove bone reprezentata en la liga estraro. Delonge, tio ne plu okazis, tial ni ĝojas pri tio kaj kore gratulas niajn amikojn pro ilia oferejo.

HEIST-OP-DEN-BERG. — « La Paca Stelo ». — Ni regule kunvenas ĉiulunde. Post la sukcesplena Esp.-kurso, gvidata de klubano nia, por la ĉi tieaj loĝigitaj soldatoj, ni organizis, la 1-an de Decembro, kursfinan feston. Samtempe ni rememorigis la Zamenhof-tagon. Estis beleta sukceso.

Al niaj mobilizitaj grupanoj ni sendis paketon.
Kiuĵ el la aliaj sekcioj de Fl. L. E. sekvos nian ekzemplon?

RUIEN. — « Mondstelo ». — Je la fino de l' jaro oni ŝatas ankoraŭ iom pripreni kio okazis dum la pasintaj 12 monatoj.


Je la komenciĝo de 1939 ni havis la feliĉon lerni, dank' al nia talenta instruistino F-ino S. Deweerdt el Oudenaarde, la gramatikajn regulojn kaj la fundamentajn konojn de la lingvo Esperanto. Sed, se ni ekzamenas, laŭ lingva vidpunkto, la faritan laboron, ni ne havas rajton multe fieri. Konsiderante la praktikadon de la lingvo, estas granda nulo. Dum ĉi tiu unua jaro ni restis surloke kun krucumitaj brakoj, kaj faris ne eĉ la plej malgrandan progreson.

Ĝis nun nia sekcio ne plenumis nek la esperojn nek la antendojn de la instruistino aŭ de nia ligestraro. Ni eĉ ne sukcesis organizi ĉiunonatan kunvenon...

La ĉefa kaŭzo de la stagno de nia sekcio estas la funebro kiu trafis nian estimatan prezidantinon S-aninon M. Brugge, pro la morto de ŝia patro; due la soldatiĝo de nia sekretario, S-ano P. Vansteenbrugge, multe malhelpis.

Sed nun, por ke la kurso de 1939 havu ian praktikan valoron, tiu ĉi stato ne plu povas daŭri, kaj okaze de la nova jaro ni decidu ne resti nenion ĉarantaj. Ĉiu membro de bona volo disponas sufiĉan tempon por ĉeesti la monatajn kunvenojn. Tiamaniere ni troviĝos en intima rondo kaj povos ekzerci nian lingvan kapablon.

Ni do klopedu fari la neceson por ke estonte ni donu signon de vekigo kaj por ke ni efektivigu, kun kuraĝo, persisto, kaj entuziasmo, la regulan, glatan funkciadon de la sekcia vivo laŭ la bela ekzemplo de la najbaraj viglaj grupoj.



Sold-o J. K. — Dankon por via promesita helpo. Ĉu ni baldaŭ ricevos la petitan artikolon? Ni ĝojas ke vi tiel ĝuas la enhavon de Fl. E.

Sold-o A. Detr. — Artikoloj de niaj mobilizitoj estos ĉiam tre bonvenaj... Ĉu vi volas prizorgi? Salutojn!

F. W. B. en B. — Ni uzos la artikolon poste, kiam la temo denove estos aktuala.

V. B. en A. — Dankon, ni zorgos pri tio. Ni ĝojas ke vi ŝatas la revuon.


Al la legantoj. — Denove, malgraŭ ĉiuj antaŭzorgoj la Januara-numero aperis kun granda malfruigo. Nek ni, nek la presisto kulpas. Estonte la revuo aperos la 1-an de la monato.



Por ĉiu bona solvo ni notas unu poenton. 25 poentoj rajtigas al premio. Por ĉiu solvo uzu apartan folion, gluu sur ilin la koncernan konkurso kuponon kaj indiku klare legeble vian nomon kaj adreson. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu sendataj antaŭ la 5a de Marto rekte al S-ano Ferd. VOLDERS, Twee Nethenstraat 46, Antwerpen.

PROBLEMO No 94.

KRUCVORTO (Ensendis S-ro VAN AS).



7. Marŝi — komercaĵo (R).
8. Speco de tetrao (R) — regularo pri homa konduto.
9. Adverbo — loko — membro (R).
10. Alta herbo (R) — ĉiutaga notlibro (R) — adverbo.
11. Speco de pasero (R) — plibeligi per aldonajoj (R).
12. Kompleta (R) — gasa elemento (R).
13. Konfido, aĉeti varon sen baldaŭa pago.

VERTIKALE :

1. Matena aŭ vespera duonlumo (R).
2. Nokta sovaĝa besto (R) — vere ekzistanta (R).
3. Surĉevala pilkludo (R) — demanda pronomo — mallonga memoriga skribajo (R).
4. Parto de tago (R) — maldika fleksibla branĉeto — bakajo (R).
5. Spirite vidi ion (R) — montra adj. — ĉiela korpo (R).
6. Eksterhavena parto de maro — sekvi per la okuloj presitan tekston.
7. Trinkajo (R) — prefikso — prepozicio — sufikso.
8. Rilata al la tertremo kaj iliaj efikoj (R) — pagilo.
9. Apartigi de la aliaj (R) — kokinproduktujo — metalfadeno (R).
10. Scii (R) — membraro — negativo.
11. Nenormala malgrandegulo (R) — papago (R) — envolvezo (R).
12. Inteligentprovo (R) — okulakvo (R).
13. Muzikinstrumento.

HORIZONTALALE :

1. Dentskrapema mamulo, kies haŭto estas kovrita per longaj pinglegoj (R).
2. Frukto (R) — strio el ledo (R).
3. Multaj horoj (R) — muzika verko en tri partoj (R).
4. Sipparto (R) — granda simio (R) — familiano (R).
5. Prefikso — prepozicio — resenda pronomo.
6. Metoda esploro de problemoj — jarparto.

PROBLEMO No 95.

Kunmetu bone konatan proverbon, prenante laŭorde el la ĉi-subaj vortoj 2 literojn sinsekvajn.

- | | | | |
|--------------|--------------|---------------|--------------|
| 1. Almanako. | 5. Laringo. | 9. Aspergo. | 13. Krimulo. |
| 2. Milito. | 6. Loterio. | 10. Kripleco. | 14. Pagilo. |
| 3. Francano. | 7. Praktiko. | 11. Furioza. | 15. Glazuro. |
| 4. Planedo. | 8. Lunĉo. | 12. Galanta. | 16. Likvoro. |

POR LA KALKULEMULOJ.

PROBLEMO No 96.

F A C I L
V E N K

La du adiciendaj nombroj estas triobloj kaj ekzistas el la ciferoj 1 ĝis 9. La unua nombro entenas ĉiujn parajn ciferojn. La dua nombro estas dekunuoblo.

6 . 2 2 0

SOLVO DE PROBLEMO 87.

Karoto — iktero — umbelo — kojoto — orbito — makako — empiro — naturo — cigaro — ilekso — sovaĝa — juvelo — alkovo — madono — fabelo — inciti — navedo — indigo — solida — dinaro — ulcero — orgeno — nebulo — enketo.

KIU KOMENCIS JAM FINIS DUONE.

SOLVO DE PROBEMO 88.

O — om — pom — miop — primo — empiro — promesi — dispremi — sportmedio — mordetis — terismo — merito — tremo — metr — ret — te — t.

Bone solvis ambaŭ problemojn : Ges. TOP — POLLET — KEVERYN — D'HONDT — COUWENBERG — VAN MULLEM — PITTOORS — VAN DER MAST — VAN TUYKOM — ISERENTANT.

STATO DE LA POENTOJ AKIRITAJ DUM 1939.

Akiris la 25an poenton kaj ricevos do premion S-ro COUWENBERG. Sekvas F-ino TOP kun (23) p.; S-ro ISERENTANT (23); F-ino VAN DER MAST (23); S-ro POLLET (22); S-ro D'HONDT (22); F-ino KEVERYN (19); S-ro VAN MULLEM (19); S-ro PITTOORS (19); F-ino SENAWE (16); S-ro VAN TUYKOM (15); S-ro ROOSE (13); F-ino VINCKE (13); S-ro DAMMAN (9) kaj kelkaj kun malpli ol 5 poentoj.

ALLERLEI

LA XII-a NEDERLANDA ESPERANTO-KONGRESO. — La XII-a kongreso de la nederlanda Esperanto-Unuiĝo « La Estonto Estas Nia » okazos la 23-an, 24-an kaj 25-an dum rato, do dum la Paskotagoj, en Arnhemo en la salonoj de « Maison de Bruijn ».

La programo estas tre alloga. Sabatvespere estos aranĝata interkonatiĝa vespero kun varia programo.

La unuan Paskotagon okazos la jarkunveno de L. E. E. N. kun festtagmanĝo, dum vespere estos prezentata granda Esperanto-revuo « La Geedzig-Kongreso ».

La gekongresanoj ekskursos dum la dua Paskotago en la ĉirkaŭaĵo de Arnhemo.

La Loka Kongresa Komitato forte instigas la gesamideanojn el Belgujo partopreni en ĉi tiun kongreson. **Arnhemo kore bonvenigos vin.**

La kosto por la tuta kongreso estas fl. 1.75. Petu informojn kaj aliĝilon al la sekretariino de la L. K. K. F-ino A. H. Kramer, Kluzeweg 40, Arnhemo, Nederlando.

SENPAĜA KORESPONDO-SERVO POR GEJUNULOJ. — « Estu Preta », nova Esperanta instru-gazeto por Usonanoj, deziras adresojn de eksterlandaj gejunuloj por sia korespondo-servo. La nura kondiĉo estas frua respondo al ricevita korespondajo. Ni prizorgos, por ke oni ne ricevu pli ol la deziratan nombron da komunikajoj. Sendu klare skribitajn adresojn al : « Estu Preta », Winchester, Illinois, Usono. Poŝtkarto sufiĉas.

ESPERANTO IN DE PERS. — Met vreugde stellen wij vast dat de groote pers meer en meer belangstelling toont aan Esperanto. Volgende dagbladen geven regelmatig Esperanto-rubrieken :

Finland : Helsinki, « Suomen Socialdemokraati »; Frankrijk : Aix-en-Provence, rue d'Italie, 23, « La Paix », maandblad; Denemarken : Valby, Naksbovej, « Frisindet Ungdom », jeugdblad; Brazilië : Rio de Janeiro, Aveni da Augusto Severo, 4, « Revista Brasileira de Geografia; Nederland : Eindhoven, S-ro A. de Smit, Bredalaan 132, « Ons Contact », jeugdblad.

Gelukwenschen aan voornemde adressen mogen niet uitblijven en zullen bijdragen tot bevordering van onze zaak.

NEDERLAND. — Gaarne brengen wij ter kennis onzer lezers het bericht dat bij onze Noorderburen ijverig gewerkt wordt aan het oprichten van Esperanto-kursussen onder de wederopgeroepenen in de cantonnementen.

Een prachtig voorbeeld. Wanneer volgen wij het op ?

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO

(Vereeniging zonder Winstoogmerken.

Staatsblad 20-12-1930. Akte 1227)

P. Van Humbeekstraat 3, BRUSSEL-WEST.

Postcheck : 3268.51

Fundamentaj Verkoj de Esperanto

Superflue estas rekomendi la verkojn de D-ro Zamenhof. La stilo de la Majstro estas, pro sia ĝusteco kaj internacieco, imitinda ekzemplo. Bedaŭrinda estas, ke la nuna esperantista generacio ne sufiĉe konas la fundamentajn verkojn. Pri tio skribis Akademiano, D-ro Corret :

« Ĉiu Esperantisto devus ĉiutage legi kaj studi kun la plej granda atento almenaŭ unu paĝon el la verkoj de Zamenhof. Se ni sekvas tiun bonegan konsilon, la ĝenerala kono de nia lingvo estus pli granda, nia stilo fariĝus internacie pli bone komprenebla pro lernado el la sama fonto.

» Dangere estus, se la studado de la verkoj de la Majstro estus iom post iom forlasita por prefere studi laŭmodajn verkojn de malpli fidindaj aŭtoroj.

» Oni memoru, ke Esperanto povas utili, nur se ĝi estas lingvo vere internacia kiu posedas unuecon. Tiu unueco povas ekzisti, nur se ĝi apogigas sur firma fundamento. Tiu fundamento nur povas esti la verkoj de nia porĉiama Majstro D-ro L. L. Zamenhof. »

Al la verkoj de L. L. Zamenhof ĉiu el ni rezervu do honoran lokon en sia biblioteko; despli, ĉar — eldonitaj grandkvante — iliaj prezoj estas eksterordinare malaltaj !

FUNDAMENTO DE ESPERANTO (11 × 17 cm., 112 p.).

La fundamento de la lingvo kaj la gvida dokumento por ĉiu bona Esperantisto ! ... fr. 5,00

FUNDAMENTO KRESTOMATIO (12 × 19 cm., 460 p.).

Post « Fundamento de Esperanto » la plej grava verko. Zorga gradigo faciligas ĝian legadon ... fr. 18,00

LINGVAJ RESPONDOJ (15,5 × 21 cm., 116 p.).

Interesaj klarigoj de gramatikaj aŭ lingvaj demandoj, plej kompetente donitaj de Zamenhof mem ... fr. 6,00

PROVERBARO ESPERANTA (15,5 × 21 cm., 82 p.).

Kvintesenco de la proverboj de ĉiuj nacioj. Esperanto havu siajn proprajn proverbojn ! ... fr. 6,00

FABELOJ DE ANDERSEN (15,5 × 21 cm., du vol. : 156 + 156 p.).

Specialan zorgon dediĉis nia Majstro al la traduko de la mondkonataj fabeloj de Andersen ... fr. 15,00

GEORGO DANDIN (15,5 × 21 cm., 52 p.).

Verko de la mondfama Molière tradukita en lingvo simpla, konciza kaj klara, laŭ la originala modelo ... fr. 3,00

LA RABENO DE BAŬARAĤ kaj LA GIMNAZIO (15,5 × 21 cm., 68 p.).

Novelo de Heinrich Heine kaj monologo de Salom Alejhem kiuj skizas la malfacilan vivon de Judoj ... fr. 4,00

IFIGENIO EN TAŬRIDO (15,5 × 21 cm., 108 p.).

Tragedio de la plej fama germana poeto : Goethe. Kvankam en versoj, la traduko estas facile komprenebla ... fr. 6,00

MARTA (15,5 × 21 cm., 240 p.).

Romano de la fama pola literaturistino Eliza. Orzeszko, elokventa pledo por la virino ... fr. 15,00

(Daŭrigo sur la kvara kovertpaĝo.)

←	KUPONO por la 94a PROBLEMO	KUPONO por la 95a PROBLEMO	KUPONO por la 96a • PROBLEMO
---	----------------------------------	----------------------------------	------------------------------------

OOSTENDE

« Reĝino de Flandra marbordo »

HOTEL METROPOLE

Kerkstraat 32

75 KOMFORTAJ ĈAMBROJ
kun fluanta akvo,
varma kaj malvarma

Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo.

Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano S NYKERS
havas la plej bonajn rekomendojn
kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ H. & H. BRAEKEVELT

ALLE DRUKWERKEN VOOR HANDEL, VEREENIGING
& FAMILIE (ROUW) ● IMMER KEURIG DRUKWERK
AUTOMAAT-INRICHTING VOOR GROOTE OPLAGEN

STATIEDREEF, 177 (TEL. 1080) ROESELARE

BESCHIKBAAR

VOOR ADVERTENTIE

HERBERG

't VLAAMSCH HUIS

GROOTE MARKT 16, BRUSSEL

BONGUSTAJ TRINKAJOJ

Flandre agrabla atmosfero
Diversaj salonoj por societoj

Ejo de N. E. L. E.
(SEKCIO BRUSSEL DE FL. L. E.)

LA FARAONO

Romano de PRUS

el pola lingvo tradukis D-ro KABE
3 VOLUMOJ! Kune 625 paĝoj!

Pasie interesa romano.
La traduko estas majstroverko de
nia granda Esperanto-stilisto.

35 fr.

Flandra Esperanto-Instituto
P. Van Humbeekstr. 3, Brussel-W.

Café Nieuwe Carnot

FRANS NEEFS-D'HELDT
Carnotstraat 70 Antwerpen

PLEJ BONAJ TRINKAJOJ
Salonoj por societoj
Malvarmaj mangaĵoj
Bonega servado

EJO DE :

Flandrema Grupo Esperantista
(SEKCIO ANTWERPEN DE FL. L. E.)

(Daŭrigo de la tria kovertpaĝo.)

HAMLETO (12 × 19 cm., 176 p.).

Vere majstra traduko de la granda tragedio en kvin aktoj de William
Shakespeare ... fr. 5,00

LA RABISTOJ (15,5 × 21 cm., 144 p.).

Teatraĵo de Schiller, satiro kontraŭ la Socio. Traduko vigla, iafoje
kruda — kiel la originalo ... fr. 8,00

LA REVIZORO (15,5 × 21 cm., 100 p.).

Gaja komedio de Gogol kiu verkis ruse. Traduko lerte konciza; plej
agrabla legaĵo ... fr. 6,00

LA TUTA SERIO AFRANKITE : 95 Fr. !